



La Kandelumo Verda

- Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo -

Vetero: tage +30, parte sunbrilo

KONGRESA KURIERO DE LA 102-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

N-RO 7 | 2017 07 29, sabato

OKAZIS

Komuna Seminario 1982-2017

Jaŭdon je 14h00-14h45 en la salono *Blanke* okazis la memorkunveno pri Komuna Seminario, kiu estas unu el la tradiciaj Esperanto-aranĝoj en Azio. Ĝi unuafoje okazis en 1982 kaj ĝin partoprenis korea kaj japanaj junularoj. Aliĝis Ĉinio ekde 2003 kaj Vjetnamio ekde 2012. Kunvenis dudeko da organizintoj aŭ ĉeestintoj de la unuaj KS-oj kaj ili kune memoris la tiaman junulan tempon kaj opiniis, ke KS kaj Esperanto ja havis grandan influon al ilia vivo.

CHOE Taesok, KN 75

TADEN-kunsido

La kunsido okazis jaŭdon, la 27-an julio, je 12h45, en la salono *Selten*. Pro malfruo de la estrarano de TADEN, nur malmultaj ĉeestis la kunvenon de la nefumantoj. Kiel menciite en la distribuita numero de "Puraj Pulmoj", la prezidanto *Jan Bemelmans* ne povis mem ĉeesti, sed indikas sian vizaĝlibron: janbemelmans2@gmail.com. En lia enkonduka teksto temis pri fumliberigo de terasoj, infanludejo kaj distancigo de fumantoj for de enirejoj. Pro la ĉeesto de du urugvajaninoj decidis gratuli pri la venka proceso, kiu liberigis la malriĉan landon de kompenspostulego de *Philip Morris*. La nederlanda asocio de nefumantoj *CAN* ne plu kompromisemas, sed volas forigi fumadon el la publika vivo cele al senfuma generacio. Tabakvaroj ne plu ekspoziciigu en butikoj, lernejoj kortoj estu sanaj ekde du mil dudek.

Robert Moerbeek, KN 42

Pri la ekskurso E2

Jaŭde la 27-an de julio ni partoprenis la ekskurson al la Korea Folkloro Vilaĝo (E2). Unue ni vizitis en *Suwon* la defendan fortikaĵon *Hwaseong*. Post bonega kaj bongusta tagmanĝo ni spektis en la urbo *Yongin* kelkajn belajn prezentaĵojn en la Folkloro Vilaĝo kaj ĉe la fino geedziĝceremonion. Ĝi estis neforgesebla travivaĵo, ĉar tiutage antaŭ 38 jaroj ni geedziĝis. Ni ĝuis agrablan ekskursotagon.

Liba kaj Floreal Gabalda, KN 345, 343

KER-sesio dum UK

La ekzamentago vendredo komenciĝis per disdono de

atestiloj de la 6-a Tutmonda Ekzamensesio. La reprezentantoj el Kolombio, Rusio, Brazilo, Japanio, Nederlando, Ĉinio, Meksiko kaj Francio transprenis la atestilojn de 60 sukcesintoj. La diplomoj de la aliaj ekzamenlokoj iros poŝte el Budapeŝto rekte al la kandidatoj. Dum la kongreso okazis ankaŭ surloka KER-sesio. Al ĝi aliĝis 25 personoj el 16 landoj. La plej multaj kandidatoj venis el Koreio. La favorata nivelo estis C1, je kiu ekzameniĝis 15 kandidatoj. Jam certas ke per tiu nombro en ĉi tiu sesio ni ekhavos 2000 KER-diplomitojn. La ekzamenadon faris *Duncan Charters*, *Francios Lo Jacomo*, *Probal Dasgupta*, *Eniko Zengo Sereghy*, *Kristin Tytgat* kaj *Sylvain Lelarge*. La ekzamenojn organizis kaj gvidis *Katalin Kovats*, la ĝisnuna estro de la Ekzamena Komisiono de UEA, kiu per tiu ĉi sesio finis sian 10-jaran laboron por la KER-ekzamenoj kaj publike demisiis el sia posteno.

Katalin Kovats, KN 1021

Pontkunveno en la Parlamento

La 28-an de julio 2017 okazis internacia kunveno kun 130 personoj el 21 landoj en la Korea Parlamento. De la 14-a ĝis la 17-a horo ili diskutis pri la unuiĝo de la du koreaj ŝtatoj. La kunvenon partoprenis la vic-prezidanto de la Nacia Asembleo (Korea Parlamento), du estroj de politikaj partioj kaj parlamentanoj. Vigla debato ekis inter la kunsidestro profesoro *SO Gilsu* kaj la 14 podianoj. Evidente ĉiu partoprenanto havas informojn de siaj amaskomunikiloj kaj de siaj lernolibroj pri historio, de siaj vojaĝoj kaj de siaj renkontiĝoj. Tio multe riĉigis la ideointerŝanĝojn.

La pontkunveno okazis sub la aŭspicioj de la Seula Speciala Urbo kaj ĝin organizis Korea Esperanto Asocio (KEA) kadre de la Universala Kongreso de la Universala Esperanto Asocio (UEA). La debato okazis en Esperanto. Samtempa interpretado estis farita por neesperantistaj koreoj.

Malgraŭ la diversaj lingvoj de la partoprenantoj, ili kiel uzantoj de la internacia lingvo Esperanto kapablis interŝanĝi ideojn senprobleme kadre de tiu pac-cela evento.

Mireille Grosjean, KN 218

Du novaj membroj de la Honora Patrona Komitato

La Honora Patrona Komitato de UEA ekhavis du novajn membrojn: Harald Helfgott kaj Giorgio Novello. Tiu honora organo konsistas el lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj eminentuloj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-Movado kaj mem parolas kaj verkis en la Internacia Lingvo. Pri la elekto de Helfgott kaj Novello decidis la Komitato de UEA en sia kunsido en Seulo.

Harald Helfgott

Harald Helfgott (n. 1977.11.25, Limo, Peruo) estas monde konata matematikisto, nuntempe *Humboldt*-profesoro ĉe la Universitato de *Göttingen*, Germanio. Post studado en la usonaj universitatoj *Brandeis* kaj *Princeton*, kie li doktoriĝis en 2003, liaj originalaj esploroj kondukis lin tra la universitatoj *Yale* (Usono), *Montréal* (Kanado) kaj *Bristol* (Britio), ĝis konstanta posteno kiel supera esploristo en la Nacia Centro de Sciencaj Esploroj (CNRS, Francio).

D-ro Helfgott estas specialisto pri la teorio de nombroj, sed liaj esploroj ampleksas plurajn aliajn branĉojn de pura matematiko, inkluzive de grupteorio kaj kombinatoriko. Jam frue en sia kariero li atingis vastan rekonon en sia fako, i.a. per la Premioj *Leverhulme* (2008) kaj *Whitehead* (2010), aljuĝitaj al speciale promesplenaj junaj esploristoj, kaj la prestiĝa Premio *Adams* (2011) de la Universitato de Kembriĝo. Mondan renomon li akiris en 2013 per sia pruvo de la malforta (aŭ triterma) konjekto de *Goldbach*, kiu dum pli ol 250 jaroj rezistis solvon. Tiu atingo helpis gajni por li la *Humboldt*-profesorecon, unu el kelkaj postenoj en Germanio rezervitaj al pintaj fakuloj sur diversaj sciencaj kampoj, kun granda esplorbuĝeto.

D-ro Helfgott eklernis Esperanton en 1997 pro scienca scivolo. Laŭ lia propra klarigo, renkontinte la koncepton de lingva kapitalo en kurso pri lingvistika antropologio, “mi subite pensis: kio estus la efiko de lingvo, kiun preskaŭ ĉiu povus lerni kun relativa facileco en malmulte da tempo?” Aŭdinte pri Esperanto, li ekserĉis en la tiama Interreto kaj kun granda surprizo trovis pli ol cent mil paĝojn pri la lingvo, inkluzive de senpaga kurso. “En la sekvintaj jaroj, mi trovis novajn amikojn, legis multajn interesajn tekstojn - unu el miaj preferataj estis volumo de hungara literaturo tradukita en Esperanton - faris mian unuan vojaĝon en Eŭropo kaj travivis home riĉigajn spertojn. Ankoraŭ hodiaŭ, mi sentas grandan plezuron kiam mi renkontas alian esperantiston - io, kio okazas en neatenditaj lokoj kaj momentoj en mia profesia vivo.”

Giorgio Novello

Giorgio Novello (n. 1960.06.24, Venecio, Italio) estas nuntempe la ambasadoro de Italio ĉe la registaroj de Norvegio kaj Islando. Post studado pri juro en la Universitato de Padovo, li eklaboris en la itala diplomacia servo en 1986, dum 15 jaroj deĵorante en Romo, Niĝerio, Britio kaj Germanio. Dum tiu tempo li krome studis en Parizo kaj Londono, kaj ricevis diplomon pri ekonomiko ĉe la Universitato de Londono en 1994. De 2002 ĝis 2006 li laboris kiel Unua Konsilisto de la Konstanta Misio de Italio ĉe la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, en Vieno. En 2004 li ricevis la titolon de Oficisto de la Ordeno pro Merito de

la Itala Respubliko, kaj samjare magistriĝis pri ekonomia historio ĉe la Londona Altlernejo pri Ekonomiko.

Ekde 2006, *Novello* deĵoris ĉe la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Romo, kiel fakestro pri Internaciaj Financaj Institucioj, kaj ekde 2008 kiel konsilisto al la Ministro pri Ekonomia Disvolviĝo. Dum tiu periodo li ankaŭ gvidis kursojn pri internaciaj rilatoj ĉe la Universitato de Triesto, en kiuj estis i.a. Esperanto. “Plenipotenta ministro” (plenrajta ŝtata reprezentanto) ekde 2009, li ricevis la postenon de ambasadoro en 2013. Liaj diplomaciaj talentoj, apogitaj de vasta kleroj pri juro, literaturo, ekonomio kaj historio, estis agnoskitaj de la franca registaro per la titolo Kavaliro de la Nacia Ordeno pro Merito (2013), kaj de la norvega registaro per la Granda Kruco de la Reĝa Norvega Ordeno pro Merito (2016).

Ambasadoro *Novello* eklernis Esperanton en 1974 “dank’ al mirinda libro de *Alessandro Bausani* pri planlingvoj”, kaj aliĝis al la Esperanta Grupo de Padovo. Li trairis E-ekzamenojn en Venecio, 1976, kaj Londono, 1993, kie li ankaŭ aktivis en la loka movado. De 2004 ĝis 2006 li estis vic-representanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Vieno. Interesata pri politikaj aspektoj de interlingvistiko kaj lingvoplanado, li estas ano de la germana *Gesellschaft für Interlingvistik* (GIL) de 2006, verkis kelkajn eseojn pri Esperanto kaj interlingvistiko en italaj revuoj kaj prelegis diversloke pri Esperanto, inkluzive ĉe la Universitato de Parma, 2015.

Nova honora membro de UEA: NGUYỄN XUÂN THU

NGUYỄN Xuân Thu (nask. 1932-08-23). Profesie farmaciisto, esperantistiĝis en 1957. Estis ĝenerala sekretario de Vjetnama Esperanto-Asocio de 2004 ĝis 2010. Membro de la centra komitato de VEA kaj estro de la trejna komisiono. Elstare kontribuis al la instruado de Esperanto kaj trejnado de instruistoj. Lingve kontrolis la vjetnamajn versiojn de “Zagreba Metodo” (2006) kaj “Esperanto per rekta metodo” de S. *Marček* (2008). Membro de la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro de UEA/ILEI ekde 2006. Ĉefdelegito de UEA de 2003 ĝis 2011.

Kiel ĝenerala sekretario de VEA gvidis la laborojn por inviti la 97-an UK-on (2012) al Vjetnamio kaj poste estis ĝia LKK-ano pri informado kaj gazetara servo; kunlabore kun edukado.net, aŭtoris belan plurlecionan preparkurson pri sia lando. Kiel longtempa instruisto de Esperanto en la Fremdlingva Universitato de Hanojo li ankaŭ trejnigis gejunulojn por labori kiel helpantoj dum la 97-a UK kaj la 68-a IJK, same kiel li pli frue faris por la 63-a IJK (2007). Al la programo de la UK li kontribuis per prelegoj en la Esperantologia Konferenco kaj la Tago de Vjetnamio.

Lia ĉefverko estas “Granda Esperanto-Vjetnama Vortaro” (2016), kun 10 652 kapvortoj. Krome li tradukis kaj redaktis la Esperanto-version de “Taglibro de *Dang Thuy Tram*” (2011). Jam frue li aktive ekuzis Facebook k.a. eblojn de Interreto, i.a. kiel kunlaboranto de edukado.net kaj redaktanto de la retejo de VEA (<http://e.vea.vn>). Ekde 2013 *Nguyễn Xuân Thu* estas membro de la Akademio de Esperanto kaj gvidanto de ĝia komisiono pri homaj nomoj.

BELARTAJ KONKURSOJ

Rezultoj de la belartaj konkursoj de UEA en 2017

BRANĈO POEZIO

Unua premio al *Nicolau Dols*, Hispanio, pro "Pasio. Poemo en ses stacioj".

Dua premio al *Jesper Lykke Jacobsen*, Francio, pro "Kosmogonio".

Tria premio al *Lode Van de Velde*, Belgio, pro "Nebulo".

Juĝkomisiono: *István Ertl*, *Krys Williams*, *Giulio Cappa*

Partoprenis 31 verkoj de 15 aŭtoroj el 10 landoj.

BRANĈO PROZO

Unua premio ne aljuĝita.

Dua premio al *Ewa Grochowska*, Francio, pro "La neĝero".

Tria premio al *Laure Patas d'Illiers*, Francio, pro "En tiu ĉi bela tago".

Honora mencio al *Carys Goldy*, Britio, pro "Tri vortoj".

Juĝkomisiono: *Trevor Steele*, *Ĵak Le Puil*, *Tim Westover*

Partoprenis 20 verkoj de 13 aŭtoroj el 9 landoj.

BRANĈO TEATRAĴO

Unua premio ne aljuĝita.

Dua premio ne aljuĝita.

Tria premio al *Amir Naor*, Israelo, pro "Amo ne serĉas, amo trovas".

Honora mencio al *Ewa Grochowska*, Francio, pro "Stranga renkontiĝo".

Juĝkomisiono: *Wera Blanke*, *Serĝo Sir'*, *Giuliano Turone*

Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

BRANĈO ESEO

Unua premio – premio *Luigi Minnaja* – ne aljuĝita.

Dua premio al *Roberto Lloancy*, Francio, pro "Kverelo sur Olimpo".

Tria premio al *Javier Alcalde*, Hispanio, pro "Pli bona ol la homa estaĵo? Esperanto kaj transhomismo".

Honora mencio al *Javier Alcalde*, Hispanio, pro "La Esperantisto de la jaro (1887-1997)".

Juĝkomisiono: *Gotoo Hitoshi*, *Antonio Valén*, *Giridhar Rao*.

Partoprenis 5 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO

Eldonejo *Graine de Moutard*, Francio, pro "La sekreto de la strigo de Dijono".

Juĝkomisiono: *Edmund Grimley Evans*, *Ricardo Albert Reyna*, *James Rezende Piton*.

Partoprenis 2 verkoj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

ANONCOJ

Venonta fervojista rendevuo

La kutima fervojista kontakt-kunveno ne okazis dum la ĉi-jara UK en Seulo, sed IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) invitas vin al sia venontjara kongreso, kiu okazos en Vroclavo, Pollando, de la 19-a ĝis la 25-a de majo 2018. Ĉiuj informoj ĉe <http://ifef.free.fr/Vroclavo2018> aŭ ĉe KN 666. Bonvenon!

Laurent Vignaud, KN 666

Infanoj kaj popola danco

Kelkaj UK-anoj partoprenos en aŭgusto renkontojn pri popola dancado kaj por infanoj kaj familioj, okcidente de Parizo, vidu en gresillon.org/somero

Jannick Huet, KN 532

Infankongres-eto ega

Entute 66 infanoj kaj adoleskantoj partoprenis kun 12 gvidantoj. Ili multe ridis, kantis, desegnis, pentris, dancis, ekskursis, skeĉis, lernis, interamikiĝis kaj konatiĝis kun fremdaj kulturanoj. Ĉiu tago ne estis sufiĉe longa por ĉion entuziasme fari kaj la teamo de gvidantoj iom puŝis ilin al lito. Hodiaŭ certe kelkaj larmoj aperos en junaj okuloj, sed ne gravas, ĉar la koroj jam plenas je tiom da feliĉaj memoraĵoj. Vivu IJK 2017 en Seulo! Rapide venu IJK 2018 en Lisbono!

SHIN Eun-sook, Songanta, KN 62

IKU-AIS ekzamenitoj

Bv. preni viajn diplomojn fine de la fermo de la rektoro prof. BAK.

Amri Wandel, KN 641

Nacia Esperanto Muzeo en Gray

Krom Greziljono kaj Kvinpetalo, kiuj partoprenis la Movadan Foiron, ekzistas tria kultura centro en Francio, la Nacia Esperanto Muzeo en la urbo. Bonvenon al ĝi!

<http://www.naciaesperantomuzeo.fr/>

Aleks Kadar, KN 640



Metalarboj ĉe la haltejo de la flughavena buso 6002 antaŭ la stacidomo *Cheongnyangni* (청량리역)

DIVERSAJ MOMENTOJ



“KAEM, saltu supren!” (Foto: SO-FFT)



Laborema eĉ en metroo (Foto: LEE Jungkee)



“Ĉiam junas ni!” (SO-FFT)



“Ni ekskursas al la palaco! hhh” (Foto: SO-FFT)



Ĵomart kaj Nataŝa (Foto: SO-FFT)



Oomotoj kaj ŝonbulanoj kunkantas.



MAJU kun JOGAILE